

& Stenjka Razin:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 232 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Mikaelo Bronŝtejn. Baladigis Martin Strid (2015) per melodio de feroa balado Roncevala batalo (Runtsivalsstriĉiĉ) kaj modifita ties rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29> (/mimi faamimi mire doLa dodore mi mi; miidodo dore redo doLa doodore mi mi;

(#Rekantaĵe: mimire doTi LaSo La;La dore mimi mi; mido dore redo doLa do Ti La a)
)×8 +)

(&Strofoj:

'1 /Tio povus okazi nur post kvina pokalo! ; Kantas mi "Stenjka-n Razin"; en krepusko de l' halo.

(×: **Velas el persa lando mi ; kun flame arda kor' ; blovas mian sonĝon (varma vento)?(sanga sento) for.)**

'2 Levas voĉon libere; super rond' aŭskultanta, ; kaj ekflugas etere tiu plendo glorkanta.

'3 Pacan Knajpo-publikon Volga-ondoj atakas. ; Al mi ŝajnas, ke mi kun kozakaro kozakas,

'4 ke la persa princino min amore karesis, ; ke en nokta senfino mi ja ĉion forgesis,

'5 ke l' kozakoj-kompanoj nun min moke blasfemas, ; ke l' persin' en la manoj antaŭsente ekstremas...

'6 Mia voĉ' ekdubetas, ĉesas plian koktelon, – ; mi en Volgon ne ĵetus amatinon, la belan.

'7 Sed post dozo da vino pretas agi fatale. ; – Eĥ, adiaŭ, persino! – mi ekklekas finale

'8 pri la amo ensorba, pri libero ekkria... ; Kion ŝatus mi sobra, tion kantas ebria.)